

# Principdeklaro de la Remonstranta Frataro

La Remonstranta Frataro estas kredkomunumo, kiu, radikiĝante en la evangelio de Jesuo Kristo kaj fidela je la principo de libereco kaj toleremo, volas honori kaj servi Dion.

\*\*\*\*\*

## Kredkonfeso de 2006

Ni konscias kaj akceptas,

ke nian ripozon ni ne trovas en la certeco pri tio, kion ni konfesas,  
sed en admiro pri tio, kio nin trafas kaj kio estas donacata;

ke nian destinon ni ne trovas en indiferento kaj avideco,  
sed en vigilado kaj ligiteco kun ĉio vivanta;

ke nia ekzisto ne kompletigas per tio, kiuj ni estas aŭ kion ni havas,  
sed per tio, kio estas senmezure pli granda ol kion ni povas ampleksi.

Gvidate de tiu konscio, ni fidas je la Spirito de Dio,  
kiu superas ĉion, kio disigas homojn,  
kaj kiu inspiras ilin al ĉio sankta kaj bona,  
por ke, kantante kaj silentaj,  
preĝante kaj aĝemaj,  
Dion ili honoru kaj servu.

**N**i kredas je Jesuo, homo plena je Spirito,  
la vizaĝo de Dio, kiu nin alrigardas kaj senkvietigas.  
La homojn li amis kaj estis krucumita,  
sed li vivas, preter la propran morton kaj la nian.  
Li estas nia sankta ekzemplo de saĝeco kaj kuraĝo  
kaj proksimigas al ni la eternan amon de Dio.

**N**i fidas je Dio, la Eternulo,  
kiu estas nemezurebla amo, la bazo de nia ekzisto,  
kiu montras al ni la vojon de libereco kaj justeco  
kaj logas nin al estonteco de paco.

**N**i kredas ke ni mem,  
senfortaj kaj eraremaj kiel ni estas,  
estas vokataj por  
– ligite kun Kristo kaj ĉiuj, kiuj kredas –  
esti eklezio en la signo de l' espero.

**Ĉ**ar ni fidas je la estonteco de Dio kaj mondo,  
je Dia pacienco, kiu disponigas tempon  
por vivi kaj morti kaj releviĝi,  
en la regno, kiu estas kaj kiu estos,  
kie por eterne Dio estos: ĉio en ĉiuj.

**A**l Dio estu la laŭdo kaj la honoro  
en tempo kaj eterne.

**A**men.

\*\*\*\*\*

## Klarigo


Kio interligas la remonstrantojn estas ilia aprobo de la Principdeklaro.

Ĉi tiu mallonga deklaro diras, ke la Remonstranta Eklezio estas kredkomunumo kiu «radikiĝante en la evangelio de Jesuo Kristo kaj fidela je la principo de libereco kaj toleremo, volas honori kaj servi Dion». Krom tio, tra la historio la remonstrantoj je kelkaj momentoj vortigis sian kredkomunumon en kredkonfeso (en 1621 kaj en 1940).

Ke neniu kredkonfeso havas aŭtoritaton nekontraŭeblan, estas memkompreneble laŭ remonstranta vidpunkto.

La celo povas esti neniu alia ol «en singardemo kaj amo montri la vojon kaj informi» (laŭ la antaŭparolo de la kredkonfeso de 1621, citita en 1940).

En ĉi tiu spirito kaj en ĉi tiu intenco la Konvento de la remonstrantaj pastoroj en 2006 vortigis la kredkonfeson ĉi tie prezentitan.



Tradukis el la Nederlanda originalo  
Gerrit Berveling